

LA DEKSEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET

179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : France, 1 franc, — Etranger, 1 fr. 50 par an

Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

CONVOCATION

(Cette convocation ne s'adresse qu'aux membres du Groupe ayant payé cotisation en 1913.)

Cher Samidean(in)o,

Vous êtes prié de bien vouloir assister à l'Assemblée Générale annuelle de notre Groupe. Cette Assemblée aura lieu le *Mercredi 19 Novembre 1913, 20 h. et demie très précises*, Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris!

Veillez agréer, cher Samidean(in)o, nos cordiales salutations.

Pour le Comité :

Le Président :

HENRI DE COPPET.

Le Secrétaire :

ROBERT BOLLACK.

ORDRE DU JOUR :

1. Rapport moral.
2. Rapport financier.
3. Proposition de modification des paragraphes 3 et 4 de l'article 3 des Statuts.
4. Questions diverses.
5. Election de la moitié des membres du Comité.

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Prochaines Causeries.

- 5 Novembre. — Fraŭlino PERTL : Tra Bohemlando.
12 Novembre. — S-ro GEORGES LHERMITTE : Sentema parolado.
— Réunion mensuelle des groupes parisiens.
19. Novembre. — Assemblée générale annuelle du groupe (voir plus haut).
26 Novembre. — Publika diskutado. La Franca Kongreso de Turismo kaj ĝiaj rilatoj kun Esperanto. La diskutado estos malfermata de S-ro HENRI DE COPPET.

Bibliografio.

Universala Unuiĝo. Larga revuo en esperanta, rusa, angla lingvoj, ĉiu numero : 2 frankoj (o Sm. 800) afrankite sedata. Adreso : S-ro N. A. Sejermann, en Lubotin, gubernio de Ĥarkov (Ruslando).

Tiu bela revuo estas laŭ ĝiaj propraj vortoj « organo por humana unuiĝo en tutaj formoj de pensoj kaj agoj ».

La temoj pritraktitaj en la unua volumo rilatas diversajn pacemajn ideojn aŭ societojn. La gazeto alvokas ĉiujn samcelanojn por ĝin helpi kaj kunlabori kun la redaktoro. Ĝi aperos « laŭ la mezuro de la materialkolektado ». La unua numero enhavas pli ol 80 paĝojn. La kovrilo montras radikon de arbo kaj ĉiu el la 20 radikeroj portas la nomon : « Universala Unuiĝo » en lingvoj malsamaj. Tiu originala kovrilo ankoraŭ plivalorigas tiun libron aĉetindan.

L'Esperanto à Paris et dans la Banlieue

La prochaine réunion mensuelle des groupes indépendants aura lieu le Mercredi 12 Novembre, au lieu de réunion de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris, à 21 heures.

La section du XIII^e arrondissement du groupe espérantiste de Paris organise une fête de propagande. La conférence sera faite par notre ami, le professeur Th. Cart, assisté du maire du XIII^e arrondissement. Cette fête aura lieu le samedi 15 Novembre, à 20 heures 30, à la Mairie du XIII^e, Place d'Italie.



Monsieur Maurice Michon, membre de la Fundamentista grupo la Dek-Sepa et président des groupes Esperantistes de Paris-Bastille, Vitry et Creil, vient d'épouser Mademoiselle Louise Guiot, secrétaire du Groupe Espérantiste de Vitry. Nous adressons nos sincères félicitations et nos vœux de bonheur aux jeunes époux.

La IX-a Kongreso de Esperanto en Bern.

La 9-a Kongreso internacia de Esperanto okazis de la 23. ĝis la 31. de Aŭgusto 1913 en Bern. La ĝenerala impresado estas, ke la sukceso estas granda kaj, ke de nun, nia Esperanto ne plu povas malantaŭeniri.

Kiel ĉiujare, multe da specialaj kunvenoj okazis: tio estas ankoraŭ pruvo, ke Esperanto estas pli kaj pli uzata kiel praktikilo. Kaj tiu konstato nature klarigas la sukceson ricevita de la IV-a kongreso de U. E. A., kiu okazis dum la Kongresa semajno. Pli kaj pli nia praktika asocio, forte penetras en ĉiujn rondojn kaj konvinkigas la plej skeptikulojn. La servoj plenumitaj de U. E. A. estas pli multnombraj ol lastan jarperiodon, kaj ĉio antaŭdiras la definitivan sukceson de nia amata U. E. A., kiu havas la meriton de modesteco kaj de privateco.



Nun, ni parolu pri la rajtigataj delegitoj « oficialaj ». Ili « decidis » negravaĵojn; eĉ multaj plendis pri la maniero laŭ kiu oni kunvokis ilin nepublike: sed oni respondis al ili, ke tiuj kunvenoj estas nur preparaj kaj ke « en tiaj specialaj kunvenoj ili preparas decidojn por submeti al la tuta kon-

gresanaro » (*). Inter la protestantoj pri tia stranga agmaniero ni citu sinjorojn Stromboli (Italo), Epstein (Anglo) kaj Sergeant (Franco); kaj « *fine estas alprenita la jena decido: La Rajtigigitaj Delegitoj havu la rajton kunveni por ekzameni kaj diskuti kaj voĉdoni preparajn voĉdonojn* » (*).

Do, laŭ tiu rilato, oni tamen proponas voĉdonojn al la kongresanaro. Sed mi kredis, ke nur la « rajtigigitaj » delegitoj rajtas voĉdoni. Ĉu ankoraŭ tio estas ŝanĝata? Ĉu tio ĉiunmomente okazas alimaniere? Estimataj « oficialuloj », se vi deziras la harmonion kaj la pacon inter ĉiuj, *malkaŝe* forlasu tiun ridindaĵon, t. e. Esp. parlamenton, kaj ni laboru kune ne « oficiale » sed private. Eĉ, en via « rajtigita » delegitaro oni protestas kontraŭ via agmaniero. Ni respektu la Fundamenton, kaj ni lasu ĉiun nacian societeton propagandi laŭ la kutimoj de ĝia lando por la plej granda bono de Esperanto, tio estos pli utila ol sencelaj kaj nebezonataj kunvenoj.

*
* *
*

La festa parto de la Kongreso estis sukcesplena: okazis publika marŝado de la kongresanaro, ekskurso en Interlaken kaj Oberland, internacia balo kaj du teatraĵoj: « Patreco » kaj « Ginevra ». Tiu lasta verko, la unua originala teatraĵo en Esperanto, estas rimarkinda dramo, kiu honorigas ĝian aŭtoron, S-ro Edmond Privat, nia konata fundamentista samideano, kaj pliriĉigas nian jam riĉan literaturon. Post la legado de tiu teatraĵo oni sin demandas: kial do S-ro Privat ne estas Akademiano? Lingvaj Komitatanoj baldaŭ tion okazigu!

Por fini tiun resuman raporton, ni diru, ke Kolonelo E. Frey, eksprezidanto de la Svisa Respubliko, kaj Direktoro de la Internacia Oficejo de la Telegrafoj, estis Honora Prezidanto de la Kongreso kaj elparolis paroladon.

La malferman paroladon elparolis S-ro de Saussure; la legantoj de « La Dek-Sepa » legis tiun atentindan paroladon en nia lasta kajero. Ni ĝoje konstatis, ke la unua premiito de la oratora konkurso estas nia juna samurbano, S-ro R. Ch. Pichon. Ni lin kore gratulu.

(*) « Esperanto » n-ro 16, paĝo 254.

Kaj Doktoro Zamenhof, vi pensas ; ĉu Doktoro Zamenhof ne ĉeestis ĉe la Kongreso ? Jes, li estis, sed laŭ lia promeso dirita en Kraków la lastan jaron, la atestimata aŭtoro de Esperanto estis *inter* la kongresanoj kaj ne elparolis la malferman paroladon.

Ĉiuj « eminentuloj » imitu tiun modestan sintenadon !

Robert Bollack.

FALĈISTOJ

Rakonto de **Blin-Pelin.**

Mirinda somera nokto, malvarmeta kaj freŝa, falis sur la teron. La senfina Trakia ⁽¹⁾ kamparo dronis en mallumo, kvazaŭ malaperis kaj detruis siajn limojn de la kvar flankoj de la neelrigardebla ĉiela arkaĵo, kaj sin fordonis al profunda ripozo sub la dolĉa kaj monotona kantado de ranoj kaj griloj. Sub la somera majesteco de la profunda stelplena ĉielo, kiu ŝutadis pacon kaj trankvilon, la naturo en muta senbrueco malkovris sian pasian bruston kaj libere sin fordoninta en dolĉeco, ekmortis en la brakoj de la potenca nokto.

Marica ⁽²⁾ kviete plaŭdigis siajn malklarajn akvojn, plenaj je dronintaĵoj kaj kun legenda trankvileco largiĝis inter siaj malhelaj bordoj, sur kiuj dense estas elkreskintaj salikoj kaj salikarbetaĵoj. Malsekeco kaj malvarmeto blovetis el ĝiaj misteraj internoj.

De la proksimaj herbejoj tie sin aŭdigis klara vira voĉo kaj traĉhis malproksimen en la silento.

— And-re-ja-a-a, And-re-ja-a-a !...

— Mi venas, mi ven-a-a-as ! — responde aŭdigis alia de malproksime.

Post malmulta tempo eklumis fajro. Ekondis brilaj kaj ludemaj flamoj, kies radioj venke estis englutataj de la cirkaŭa mallumo, tiel ke apenaŭ vidiĝis la duonkuŝantaj ĉirkaŭ la fajro kvin falĉistoj, surkovritaj per kiteloj. La fajro strange lumigis iliajn sunbruligitajn, malafablajn vizagojn, spirite

1. Suda parto de Bulgarujo. — *Rim. Tr.*

2. Nomo de rivero en suda Bulgarujo. — *Rim. Tr.*

streĉitajn de la nokto, apogitajn sur vejnaj, kun falditaj manikoj manoj, mallumebrilaj kiel fero.

Ĉiuj estis grandaj vilaĝanoj venintaj el la malproksimaj Zagoraj⁽¹⁾ ĉirkaŭaĵoj kun falĉiloj sur ŝultroj por serĉi laboron en la ebena Trakio, kie la herboj maturiĝas pli frue. La plej juna el ili estis malgrasa, bruneta junulo, kun vivecaj brilaj okuloj kaj malĝoja vizaĝo, juna, preskaŭ infana. La plej maljuna estis ĉirkaŭ tridekjara, kun variola, plena kaj ruĝa vizaĝo, kun blondaj grandaj lipharoj, torditaj bravule al la oreloj. Liaj malgrandaj grizaj okuloj konstante ridis.

Li malrapide kaj trankvile rakontadis ion, rigardante la blankan malgrandan hundeton, kiu kuŝis antaŭ li apud la fajro.

— Unutempe, en iu regno estis reĝino.... Ŝi estis bela, bela, alia kiel ŝi ne ekzistis en la mondo.... Ŝiaj haroj treniĝis post ŝi kiel silka rivero kaj brilis kiel oro. Ŝiaj okuloj estis nigraj kiel ĉi tiu nokto, kaj de ĉiu, kiu ilin ekrigardis, la animo perdiĝadis en teruran abismon de amo kaj sufero. Ŝia kolo brilis blanka kaj hela, kiel la akvoj de ŝaŭmanta akvofalo, briligitaj de la Suno!...

— Blagolaĵo⁽²⁾, mensogu pli malmulte! — sin aŭdigis la junulo, ekspirinte profunde.

— Lazo, nun silentu! — diris la aliaj tri aŭskultantoj.

Blagolaĵo lin ekrigardis rekte en la okulojn kaj diris :

— Tio estas fabelo, hej bubo!...

— Tio estas avinaj babiladoj... elpensaĵoj! — diris firme Lazo kaj iel nedecide kaj timeme ekĉirkaŭrigardis en la mallumon, kie je kelkaj paŝoj de ili trankvile moviĝis en la salikaĵoj la nigra silueto de la azeno sin paŝtetanta.

— Tio estas fabelo, ĉu vi komprenas? — rediris Blagolaĵo kaj aldonis : — kian veron vi serĉas en la fabeloj? Kian?... Ĉu vi volas, ke mi rakontu al vi, tiel dire, pri la ĉifonaj kalsonoj de avo Todor, aŭ pri la elĉifita ĉapo de avo pastro?...⁽³⁾ Aŭ vi volas aŭdi kiel nudaj-nuduloj, kiel ni kun falĉiloj sur ŝultroj kaj kun maiza pano en saketoj, piedbatas vojon dum tuta semajno por aliri Trakion falĉadi? Ĉio tio ĉi bu-bo bu-

1. Regiono en Bulgarujo. — *Rim. Tr.*

2. Nomo. — *Rim. Tr.*

3. En Bulgarujo ĉiu maljunulo estas nomata avo. La pastroj, ofte ankaŭ la junaj, oni titolas « avo-pastro ». — *R. Tr.*

ba, estas ve-ro, ve-ro estas ĉu ne? He, kial vi bezonas tiun malbenitan veron, nu?

— Sed tiajn mirindajn aferojn, kiujn vi al mi rakontas, kial mi bezonas? — respondis Lazo.

— Mirindaj ili estas, sed belaj!... Vi aŭskultas, aŭskultas kaj poste vi forgesiĝas, foriras.... Kaj jen, vidu, ke la mirindaĵo komencas ŝajni al vi vero, vi ekvivas kun ĝi kaj enprofundiĝas en ĝin, kvazaŭ vi renaskiĝas.... Tial estas fabeloj, tial ilin la homoj ankaŭ rakontadas. Ankaŭ la kantoj estas pro tio....

Kaj Blagolaĵo daŭrigis sian fabelon:

— Tiu reĝino estis, vi scias fajro!... Tri fojojn ŝi edziniĝis, je tri reĝidoj, kaj la tri edziĝintoj ankoraŭ la unuan nokton mortis en ŝiaj brakoj, sufokitaj en la ondoj de ŝiaj haroj.... Per ŝiaj nimfaj kisoj ŝi kiel aspido elsuĉadis el iliaj buŝoj sangon, ruĝan sangon, kaj ĝin trinkis.

La lastajn vortojn Blagolaĵo elparolis akre kaj kun premitaj makzeloj, kvazaŭ li enpikis tranĉilon. La aŭskultantoj respondis al tiu tranĉilenpiko per pasiaj emocioj. Unu daŭra kaj peza siblado nevole eliĝis el la brustoj. Lazo pugnofrapis la teron kaj ekĝemis:

— Ha, tiu sorĉistino!...

La aliaj, forlogitaj de la fabelo, faris al li signon por silenti.

Poste? — flame insistis Lazo.

— Kion pli ol tion vi volas, — diris trankvile Blagolaĵo.

— Sorĉistino! — denove ekspiriŝ Lazo. — Hej, Blagolaĵo, mi akceptus tian morton, mi diras al vi, mi akceptus. Mi dronu en ŝiajn harojn, en ŝiajn orajn harojn, mi algluiĝu al ŝia buŝo, kaj tiam ŝi suĉu mian sangon, ŝi eltrinku ĝin ĝis la lasta gutu! Estu de tio mia morto!

— Vi — tion? Se mi eĉ vidus, mi ne kredos, — diris unu el liaj kunuloj, kaj pliboniginte la fajron, li komencis sopranvoĉe kaj laŭte ridi.

— Ankaŭ via Penka havas orajn harojn.... Kial ŝi vin ne mortigas?

— Alia estas mia Penka. Ŝi estas kvieta....

— Ho-ho-o-o!... tial vi ŝin forlasis altreniĝinte tien ĉi!... via koro estas malviva, amiko! Ne estas eĉ monato de kiam vi edziĝis, kaj vi satiĝis je ŝi kaj ŝin nun vi forlasis, — respondis Stamo, kiu ĝis nun silentis kaj pensis ion.

Li havis krudan rigardon kaj senmovan vizaĝon, sur

kiun la fajra lumo ludis kiel sur ŝtonon. Lia voĉo estis tiel same peza kaj kruda.

— Tio estas mia afero, — respondis Lazo surde, kvazaŭ englutis sian voĉon.

— Ankaŭ ŝia afero estos, trovonte al si alian kunulon, se ne estas jam trovinta ĝis nun, rediris Stamo.

— Ne kredu — respondis iel timeme Lazo pikita de ia malklara konjekto.

Ekregis daŭra silento. La lastaj flamoj de la jam forbrulantaj lignoj tremis super la fajro kaj senforte, preskaŭ estingiĝe. Ie malproksime aŭdiĝis sopranvoĉa ekkrio, kiel kompatinda elĝemo de iu detruita per kuglo juna animo, levigis alten kaj malbonsigne kaj, kvazaŭ frapita en la cielan kupolon, falis en la misterajn akvojn de Marica, dronis kaj mortis. La falĉistoj ekinterrigardis sin timeme. Iliaj okuloj sin interdemandis. Blagolaĵo mistere levis fingron, enaŭskultiĝis longe kaj diris:

— Tio estas strigo.

En la salikaĵoj la timigita azeno neregule eksonorigis la malklaran sonorilon. La hundeto saltis kaj ekbojis kontraŭ la mallumo. La mistera nokta silento fariĝis iel terurŝajna. Lazo ekspiris profunde.

— Spiregu, junulo — estas kialo !... Hejme junan edzineton vi lasis, — diris ŝerce kaj ruze Blagolaĵo, kaj denove ekparolis en la lingvo de siaj fabeloj :

KONTRAŭ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

KONTRAŭ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** de la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WBITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

— Malkvieta estas la junula sango, junuloj! Vi ne miru, ke troviĝas perfidemaj edzinoj, forlasitaj de siaj bravuloj!... Ĉu vi scias kion estis dirinta la monaĥo Misail, forjetinte siajn barbon kaj ĉapon: « Avo ĉefepiskopo », li diris, la koro postulas sian rajton! » Kaj tio estas vera.... Malbenita koro, ĝi volas kaj ne demandas, ke iu, ekzemple Lazo, suferus.

— Por Penka tio estas facila, ŝi havas malnovajn amantojn, sin aŭdigis malvarme Stamo kaj sterniĝis.

Lazo denove ekrigardis timeme en la mallumon. La ŝtonaj vortoj de Stamo lin frapis en la koron.

La fajro estingiĝis. Fariĝis mallumo. La grupo kuŝiĝis dorse. Unu stelo fulmeglitis kaj tranĉis la ĉielon per fajra streko.

— Iu bedaŭrindulo fordonis spiriton, — ekparolis Lazo.

— Aŭ iu juna edzino fordonis sin al iu, — diris ne movante sin Blagolaĵo kaj demandis :

— Lazo, ĉu vi estas aŭdinta la kanton pri la malfidela edzino Stojanica?... Ĝi estas mirinda kiel la fabelo. Ĉu vi volas, ke mi ĝin kantu ?

— Tute egale.... Estante tiaj azenoj ! — diris Lazo.

Tuj en la mallumo ekaŭdiĝis forta, dolĉa kaj tremanta tenorvoĉo kaj vibre ekkantis malgajan kaj sentigan kanton. La vortoj, kiel ĉarmaj kaj bonodoraj floroj, el kiuj oni plektas kronon, elfluadis unu post alia, kaj, kvazaŭ kun senfina doloro enfluis en la flamefluantan torenton de sonoj kaj rakontis la historion de la malfidela Stojan'a edzino, gracie, kvazaŭ kun larmoj.

Juna Stojan', soldato, aliris kaj ordonis al sia hieraŭ alkondukita bela edzino, ke ŝi ne iru, se ŝi lin amas, al la Gurguljovo'a fonteto por akvo. Apenaŭ Stojan' malaperis, kaj Stojanica (1) rememoris pri la juna Gurgul' kun kiu ŝi amindumis. Ŝi sin bele revestis, enpikis floron sur oreilon, kaj kun blankaj kaldronoj sur ŝultro, ŝi iris al la malbenita fonteto (2).

... Tie ŝin renkontis juna Gurgul', —

Lia juna koro batadis,

Liaj nigr-okuloj briladis....

(1) t. e. laŭsence Stojan-edzino. Laŭ bulgara lingvo ĉiu edzino povas ricevi la nomon de sia edzo, nur aldonante al ĝi la sufikson « ica », kio proksimume signifas : *kunulino* de la samspeca *ulo*. — *Rim. Tr.*

(2) En Bulgarujo ĝenerale la vilaĝanoj portas akvon ĉerpitan el fontoj kaj putoj (ĉar la vilaĝoj ne estas provizitaj per fontanoj), en kaldronoj, kruĉoj aŭ siteloj pendantaj je vekto sur ŝultro. — *Rim. Tr.*

Blagolaĵo ĉesis kanti kaj, sin levetinte, diris :

— Ĉu plaĉas al vi ĉi tiu kanto, Lazo ?

Sed Lazo ne respondis.

— Li dormas, — diris Blagolaĵo, kaj sin apogis sur kubuton.

— Li dormas aŭ ploras, — sin aŭdigis Stamo.

— Se mi estus kiel li, mi nun estus foririnta hejmen, kredu Dion, — diris moke Blagolaĵo.

Sed Lazo kuŝis kaj pensis. La moko de liaj kunuloj enpikiĝis kiel akraj pingloj en la koron kaj haltigadis lian spiradon pro turmento. Tiuj ŝercaj pervorte ludoj momente ekŝajnis al li eblaj. Penka vere lin amas, sed nevidataj okuloj estas baldaŭ forgesataj.... Ŝi povus ankaŭ trompiĝi, ŝi estas sensperta kaj facile eraros.

« Hieraŭ li min prenis kaj nun min li forlasis por vagi », diros ŝi al si, kaj jen.... — La malgaja historio, kiun klarigis la kanto, forlogis la penson de Lazo en lian vilaĝon. Tie same estas fonteto. Ĝi estas kaŝita en arbeto sub la vilaĝo. Tien lia Penka ĉiun matenon kaj ĉiun vesperon iras....

Turmenta ĝemo eliĝis el la brusto de Lazo.

La nokto antaŭiĝis kaj forlogis en profundajn dormojn ĉion ĉirkaŭan. La malklara sonorilo de la azeno jam ne plu sonoris. La blanka hundeto, envolviĝinta bule, trankvile estis ekdorminta apud la forbrulinta fajro, super kiu en lasta agonio leviĝis kaj estingiĝis senpovaj flametoj.

Marica kviete plaŭdetigis siajn malklarajn akvojn inter la dormemaj bordoj kaj rakontadis fantaziajn fabelojn al la nekto....

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝ-atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

==== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. ====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

La falĉistoj unu post alia ekdormis. Apud la fajro senmove ekmallumis en la nigra nokto illaj fortikaj korpoj, envolvitaj en kiteĵoj.

Nur Lazo ne dormas. La ŝercoj malheligis lian junan animon kaj lia imago ekpentris bildojn unu post alia pli turmentajn. Lia penso flugis al Penka en la vilaĝon. Li sin vidas maldika, laborema kaj blanka kiel nego. Ŝi staras sur la doma sojlo, kaj longe, kaj malgaje rigardas la polvan vojnon, kiu kurbiĝas tra la kamparo al malproksimaj direktoj. Laŭ tiu vojo foriris Lazo kaj sin lasis. Sin li lasis pro malbenita laborenspezo.... Malfacilaj fariĝis la jaroj, kion oni povus fari.... Morgaŭ frue ŝi levigos kaj lerte, kiel cervino, iros al la fonteto por akvo....

Tie ŝi, eble, trovos... he, oni scias kiun!... Li multe sin amindumatakis ĉe la rondodanco. Li estas freneza kapo, ruzulo kaj malpacemulo.... Sed ankaŭ Penka estas tia, kiel li....

Jen. Mallumaj kaj foliarplenaj arbetaĵoj malvidebligas la fonteton. En ilia verde blankas la ĉarma vizaĝo de Penka, honteme klinetiganta malsupren kaj sur ĝin glitas kareso de vira mano.... Fremda mano....

Lazo konsterniĝis kaj... levigis.

— Kion mi faris tie ĉi? — ekpensis li kaj forvolvis de si la kitelon.

La nokto silentis. Nur la griloj trankvile kaj unuvoĉe pepadis : Penka, Penka, Penka....

* * *

Frue la matenon, kiam la matenruĝo de la proksima tago vekis la falĉistojn, ili vidis, ke Lazo ne estis ĉe ili.

El bulgara lingvo tradukis

N. HRISTOSKOFF.

~~~~~  
\*\*\*\*\*  
~~~~~

OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».

- L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons fr. 1,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de
2000 phrases de la vie usuelle fr. 1,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof,
édition pour ténor ou soprano fr. 1,50



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
Fer Robin

mirinde efikas

KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ

Akoelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉiu mango, ĉu en loma akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn
 POSTULU la
 nomon de ROBIN

VENDEJO POGRANDE:
 13, Rue de Poissy, PARIS

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : L. DESPRÈS.